



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

Abonantoj por
1 9 7 5
ricevas senpage
la restajn nume-
rojn 1974!

Abonu nun!

Eldonanto/Herausgeber

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 32/1974 - 10 sep 1974
Aperas ĉiusemajne

Brita opozicia ministro pri Esperanto

Hamburgo/Londono (pp). Sinjoro Ernle Money, brita opozicia ministro pri kulturo kaj kunsekretario de la Grupo por Esperanto en la Brita Parlamento, faris dum la Solena Inaŭguro de la 59a Universala Kongreso de Esperanto en Hamburgo jenan paroladon en Esperanto:

"Sinjoro Prezidanto, Sinjoro Urbestro, Gesinjoroj,

estas por mi granda plezuro, ĉeesti ĉi tiun solenan inaŭguron de la 59a Universala Kongreso de Esperanto, en Hamburg.

Kiel reprezentanto de la Esperanta Parlamenta Grupo de Britujo mi havas la honoron paroli por ĉiuj politikaj partioj en ambaŭ ĉambroj de la Parlamento kaj por esperantistoj de ĉiuj partoj de la lando.

Mi estas politikisto: kaj mi forte opinias, ke la vera demokratio dependas de la homoj mem kaj de ilia kapablo interkompreniĝi. En la ege kompleksa mondo, en kiu ni vivas, fronte al ĉiam pli kompleksaj problemoj, nun gravas pli ol kiam ajn antaŭe, ke ni komprenu unu la alian sur individua bazo kaj ne nur per formalaj politikaj kanaloj.

Vojaĝado nun fariĝis tiel facila kaj rapida, ke ĉie prezentigas la okazo komuniki kun alilandanoj; sed ankoraŭ tra la tuta mondo ni suferas pro la malbena de la Turo Babela. Ĉiu, kiu partoprenis diskutojn sur internacia nivelo, bone scias kiel malfacile estas ĉe Unuigintaj Nacioj, ĉe Unesko, ĉe la Konsilantaro de Eŭropo, ĉe la Eŭropa Parlamento, aŭ ĉe profesiaj aŭ komercaj konferencoj - kiel malfacile estas atingi spontanajn, precizajn kaj sincerajn interkompreniĝon anstataŭ la kutima oficiala, preparita, pompaĉa duonkompreniĝo pere de la tradukistoj.

Tiu, kiu malbone parolas fremdajn lingvojn - kiel mi ekzemple - scias, kiel kore oni deziras libere paroli kaj vere amikiĝi kun alilandanoj. Bedaŭrinde, tiu deziro ofte malaperis sub amaso da neprononceblaj vortoj kaj nekompreniblaj frazoj.

Tial mi persone kredas, ke Esperanto estas necesa por la estonteco de ni ĉiuj - necesa, ĉar Esperanto antaŭenigos la pacon, - necesa, ĉar Esperanto estas vera bazo por individua amikeco - kaj necesa, ĉar nur Esperanto ebligas al venontaj generacioj lerni lingvon taŭgan por ĉiuj, lingvo kiu forprenas la privilegion de la lingva elito.

Mi deziras plenan sukceson al la kongreso kaj al ĉiuj kongresanoj. Mi deziras, ke la parlamentanoj en ĉiuj landoj konkludu pri la granda valoro de Esperanto. Mi deziras, ke vi ĉiuj kontaktu viajn parlamentanojn kaj ke vi persvadu ilin subteni la instruadon de Esperanto en la lernejoj; ĉar tio estas la sola maniero, per kiu ni povas solvi la lingvan problemon."

Pilo-Press: Jara abone 30 GM. Abonpagojn oni sendu al Ludwig Pickel, D-85 Nürnberg 1, P&K. Nürnberg 819 56-851 aŭ Stadtparkasse Nürnberg 1.901.579

60a Universala Kongreso de Esperanto 1975

Kopenhago (pp) La 60a Universala Kongreso de Esperanto okazos de la 26a de julio ĝis la 2a de aŭgusto 1975 en Kopenhago. La preparlaboroj jam komenciĝis, fondiĝis la Loka Kongresa Komitato sub la prezidanteco de s-ro G. Kühlmann.

Kongreskotizoj:

Ĝis la 31 dec 1974 validas jenaj kongresaj kotizoj:	Gld.
1) Kongresano ne membro individua de UEA	118,--
2) Kongresano individua membro de UEA kun jarlibro	98,--
3) Kongresano individua membro de UEA kun jarlibro kaj revuo "Esperanto"	78,--
4) Edz(in)o de Kongresano en kategorio 1	82,60
5) Edz(in)o de Kongresano en kategorio 2 aŭ 3	68,60
6) Junulo ĝis inkluzive 20jara	35,40
7) Universitata studento ĝis inkluzive 30jara	59,--
8) Blindulo	47,20

La kongreskotizo inkluzivas la partoprenon en la kongresaj aranĝoj sed ne loĝadon, ekskursojn, veturkostojn k.s.

Informoj kaj aliĝiloj estas haveblaj ĉe Ludwig Pickel, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113 aŭ rekte ĉe Universala Kongreso de Esperanto, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando.

+++++

Kunveno de EEC

Hamburgo (pp) Kadre de la Universala Kongreso de Esperanto en Hamburgo okazis kunveno de la Eŭropa Esperanto Centro (EEC) por la landoj de la komuna merkato, kiun partoprenis 54 personoj el 13 landoj.

En sia malfermparolado d-ro Denoel substrekis ke la konvencio de Luksemburgo estu samtempe laborplano por la landaj asocioj kaj EEC. Por ke la Centro povu celtrafe labori ĝi devas esti regule informita pri la agadoj en la koncernaj landoj. Agadoj de EEC estu samtempe realigitaj en ĉiuj landoj.

Oni eksciis, ke Francio ĝis nun ne subskribis la konvencion. Tiurilate f-ino Nourmont rimarkas, ke, laŭ franca vidpunkto, la celo de EEC ne estu "tro altruda", ne estas la tasko de EEC enkonduki Esperanton en EEC.

El la jarraporto de EEC:

- 1) Dissendo de la rezolucio de Luksemburgo.
- 2) Ratifo de la konvencio.
- 3) La Eŭropa Centro por Kulturo en Genevo aperigis trimonatan revuon (Eŭropa Dokumentaro) en Esperanto, antaŭe nur en angla kaj franca.
- 4) La Nederlanda sekcio de la Eŭropa Movado aperigis sian informbultenon en Esperanto.
- 5) Stariĝis kontaktoj kun la Eŭropa Unuiĝo de Geinstruistoj.
- 6) Korespondado kun la Prezidanto de la Komisiono por Junularo kaj Kulturo de la Eŭropa Parlamento.
- 7) Larĝa informado al la membroj de la Komisiono por Esploro, Scienco kaj Edukado.
- 8) Dissendo de la rezolucio de la Beneluxa Kongreso, Lieĝo 1974.

Internacia Literatura Konkurso (Teatro)

Sabadell (pp) Centro de Esperanto Sabadell organizas internacian konkurson, en kiu estos premiataj la verkoj plej gajaj, modernaj, ŝprucantaj feliĉon kaj amon al la vivo, kun grandnombra rolantaro, cele al teatro-prezentado. Oni aljuĝos du premiojn, ambaŭ kun rajto al unumonata senpaga restado inter Sabadell kaj "Costa Brava". Oni ne bezonas kasi sian nomon en aparta koverto. Limdato estas la 15a de marto 1975.

Pliajn informojn donas: Centro de Esperanto Sabadell, Apartado 407, Sabadell (Barcelona), Hispanio.

Esperanta Sekcio de Guozi Shudian

Pekino (pp) Fondiĝis Esperanta Sekcio de la ĉina publikiga centro Guozi Shudian, Pekino, kiu nun transprenis la vendadon de Esperanto-eldonaĵoj en Ĉinio, i.a. ankaŭ la revuon El Popola Ĉinio. La adreso estas: Esperanta Sekcio de Guozi Shudian, P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio. Tiu sekcio anstataŭas la iaman Ĉinan Esperanto-Ligon.

Interlingvistika Informa Servo

Hamburgo (pp) La abonprezo jara al INTERLINGVISTIKA INFORMA SERVO, eldonita de Societo por Internacia Lingvo aperanta kvarfoje jare estas 12,- DM/GM. Unuopa numero kostas 2,75 DM, la kompleta jarokolekto 1973 estas havebla kontraŭ 3,- DM.

Abonu aŭ aĉetu ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113.

Internacia Somera Universitato

Hamburgo (pp) Pri la prelegoj de la ĉi-jara Internacia Somera Universitato kadre de la 59a Universala Kongreso de Esperanto aperis broŝuro dulingva (Esperanta kaj germana) kun la prelegaj resumo kaj fotoj de la prelegantoj.

El la enhavo: Prof. d-ro Ivo Lapenna, Bazaj juraj aspektoj de la Eŭropaj organizaĵoj; Prof. d-ro Sin'itirō Kawamura, Kiu nutras nin homojn sur la tero?; Prof. d-ro Helmut Ebinger, kiu estis la rektoro de la ISU, Pli bona kompreno de aliaj landoj kaj popoloj pre de moderna geografia instruado; Oton Pancer, La nuntempaj agrikulturo kaj hortikulturo kaj ilia kontribuo al kreado de sana medio por la homaro; D-ro Paul Neergaard, Urgaj taskoj de la scienco en la proksima estonteco; D-ro Kazimierz Kordylewski, La malkovro de polvaj terlunoj; Prof. Juan Régulo Pérez, Kanaria insularo kaj ĝia birdo la kanario; Mahomet Izmailoviĉ Isaev, La rolo de sciencisto en evoluo de lingvo; Prof. d-ro C. Stop-Bowitz, La didoj, birdoj ekstermitaj kaj pridisputataj; Prof. Gaston Waringhien, La inkunabloj de Esperanto; Prof. Vasil Peevski, La scienco kaj la Internacia Lingvo. La 24paĝa broŝuro kostas 1,20 DM kaj haveblas ĉe Libroservo Pickel, Nürnberg.


Citaĵoj

Dankon pro.....la du kajeroj de PILO-PRESS, kiujn mi legis kun intereso, des pli, ke ili certe enhavas oficialajn vortojn, kiuj probable ne aperos aliloke.

J. Régulo Pérez, La Laguna

....mi volas rekompence honortitoligi vin per la aldono de -czinski. Ja ne longe daŭros kaj vi fariĝos honora civitano de Polujo - laŭ la oftaj mencioj en Radio Varsovio kaj laŭ viaj meritoj por la simpatia patrio de Zamenhof.

Gruno Gahler, Glinde



FOL. CAF - GLADYSZ

Zamek Królewski

Zamek Warszawski, którego odbudowę warszawiaczy śledzą od początku, znany jest wszystkim, ale z ulicy. To okazja - budowa, jak to widać na zdjęciu, doskonale już prezentuje się z "kolejnego punktu". Dopiero ta perspektywa odkrywa wszelkie niuanse architektoniczne zabytku.

kie d-ro Bormann faris prelegon en la kafejo "Esperanto" kun traduko en la polan por la ne-esperantista publiko. Per aŭtomobilo ili veturis de Szscecin al Varsovio, kie ili estis intervjuitaj de A. Pettyn. Pri la reconstruo de urba kerno de Varsovio d-ro Werner Bormann, kiu profesie sin okupas pri la rekonstruado kaj planado de urboj, el ekonomia vidpunkto, diris: "La rekonstruo de la kerno de Varsovio estas tre plaĉa. Mi scias, ke estas multegaj diskutoj eĉ disputoj pri tio, ĉu tio estas falsigo aŭ ne. Sed mi opinias ke homoj estas komplete rajtigitaj se okazis bedaŭrindaj detruoj rekonstrui en la sama maniero. Varsovio pro tio donas tre ege gravan modelon por ĉiuj urboplanistoj en la tuta mondo; Ke ne nur estas eble tion fari, rekonstrui laŭ la malnovaj materialoj kaj dokumentoj, sed ke tio ree ekprenas sian specialan vivon kaj vere la Varsovianoj estu feliĉaj ke iliaj arkitektoj - eble kontraŭe al la konvinko de aliaj arkitektoj - en tiu formo konstruis la urbon."

Profesoro d-ro Frank en Poznan

Poznan/Paderborn (pp) Laŭ telefona informo de prof. d-ro Helmar Frank, Paderborn, okazos de la 19a ĝis 23a de septembro en la pola urbo Poznan la 8a Internacia Klerigteknologia Kongreso en la instituto Zaklad Nowych Technik Nauczania. Dum la kongreso oni montras ankaŭ la novan instru-aŭtomaton ROBBIMAT-2KYBERNET de prof. d-ro Frank de la Instituto por Kibernetiko, Paderborn. Prof. Frank persone prezentos la aŭtomaton, ankaŭ kun Esperanto-programo, la 19an kaj 20an de septembro - cetere prof. Frank parolas ankaŭ Esperanton. Aliaj kunlaborantoj de la instituto restos ĝis la 23 sep 74 por demonstri la aŭtomaton. Polaj esperantistoj estas kore invitetaj observi la funkciadon de la instru-aŭtomato kun la Esperanto-programo. Estus ankaŭ bone, se la Esperanto-Redakcio de Pola Radio povus sendi reporteron al Poznan por raportii kaj intervjui prof. Frank.

Esperanto en la radio: Pro la aktuala informo de prof. Frank tiu rubriko aperos nur en la venonta numero. Tamen mi denove atentigas pri la aktuala konkurso de la Esperanto-redakcio de Pola Radio. Skribu!

Reĝa Kastelo en Varsovio

La apuda foto el Trybuna Ludu montras la rekonstruitan Reĝan Kastelon en Varsovio en la nuna stato laŭ aspekto de supre.

S-ino Elisabeth Bormann, kiu kun sia edzo, restadas nuntempe en Pollando antaŭ la mikrofono de la Esperanto-redakcio de Pola Radio konfesis, ke ŝi ĝuis la malfruverperan promenadon tra Varsovio, "ĉar mi unuan fojon ankaŭ konatigis kun la Reĝa Kastelo en Varsovio kaj estis tre fiera, ke mi iam dum vizito de amiko Tomecki donacis kelkajn markojn por la rekonstruo de la Reĝa Kastelo. Kaj mi sentas la spiriton, ke la ŝtonoj aŭ brikoj vokas min, ke estas miaj brikoj kiujn mi donacis por la rekonstruo."

D-ro Werner Bormann pri la rekonstruo de Varsovio

Varsovio (pp) Kiel ni jam informis, ges-roj Bormann ferias en Pollando. Ili vizitis Szczecin,